



aktuala

35-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N° 0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Eltiro 200 ekzempleroj. In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.leadhoster.com; esperanto.net; esperanto.be; e.r.n.u.net; uea.org; liberafolio.org; eo.eventeo.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Esperantaj Eventoj, Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda
- Paĝo 3 - Pri SEL - Skolta Esperato-Ligo
- Paĝo 5 - Jacob Hasbun tradukis araban noveleton 17
- Paĝo 6 - Soneto laŭ Vikipedio
- Paĝo 7 - Sonetoj de Sylla, Bronŝtejn, Garcia kaj Nekrasov
- Paĝo 8 - Jakvo Schram pri Bob, la prezidanto
- Paĝo 11 - Itala 77a E-Kongreso en Linjano Orsabla, regiono Friulio
- Paĝo 13 - Marlène kaj Arie Bouman pri Rusia Esperatumado
- Paĝo 17 - Liba Gabalda pri 6a Azia Kongreso

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Julio kaj Aŭgusto 2010

grupo ferias ek de merkredo 30 Junio ĝis merkredo 8 Septembro

Septembro 2010

- 15 Trevor Steele prezentas sian plej novan romanon "Flugi kun kakatuoj"
- 22 Bernard-Regis Larue pri astronomio
- 29 Marc Demonty pri signifo de niaj sonĝoj (revoj)

Oktobro 2010

- 6 Marcel Delforge pri lia vojaĝo trans Siberio
- 13 Semajna kunveno
- 20 Diemante Aniĉiene pri historio de Litovujo
- 27 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

83A KONGRESO SAT



Komuna fotado post la inaŭguro en la kolegio Andrej Ŝaguna en Braŝovo, Transilvanio, Rumanujo



Solena inaŭguro la 1an de Aŭgusto



La kvar kongresanoj venintaj de Belgujo

La 83-a Kongreso de la Sennacia Asocio Tutmonda, kunvenis en Braŝovo (Rumanio) kun ĉirkaŭ cent da partoprenantoj el dudeko da landoj, ek de la 1an ĝis la 6an Aŭgusto 2010.

La 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenis en Havano (Kubo) kun 1002 partoprenantoj el 59 landoj, ek de la 17an ĝis la 24an Julio 2010. *Fotoj ĉe* < <http://xurb.110mb.com> >

95A UK



Inaŭguro de la 95-a UK de UEA en Havano, Kubo

SEL **SKOLTA ESPERANTO-LIGO** ***Ne maltrafu!***

2a-SEL-umado okazos ĉe Bruselo, inter 29a oktobro kaj 2a novembro 2010. Dum SEL-umado ni ne nur rekontiĝos, sed ankaŭ organizos estontajn agadojn de SEL. Ni invitas ĉiujn esperantistajn geskoltojn partopreni.



Ko fotis Guido, Fabien kaj Volker dum unua SEL-umado en Kraainem apud Bruselo, 30/10 ĝis 2/11-2009

Kunlabori

Skolta Esperanto-Ligo havas belegan historion, multe da sukcesoj kaj aktivuloj kiuj senĉese daŭrigis la agadon de la ligo dum preskaŭ 100 jaroj. Ni kredas ke la ideo de Esperanto-uzado inter geskoltoj estas tre praktika kaj la apogo de Baden-Powell konfirmas ke la Ligo havas granda potencon en la skolta movado, speciale en la nuntempa mondo! Tamen, ni devas agi saĝe kaj uzi efike la energion de SEL-anoj en la tuta mondo. Kompreneble ni ne intencas kontraŭbatali la ĉieeston de la angla, franca, hispana aŭ ĉina lingvoj sed ni kredas ke ni povas sukcesi kaj promocii interkulturan dialogon, diversecon kaj respekto de lingvaj rajtoj inter geskolto.



Ni volus prezenti la pragmatikan valoron de Esperanto en la skolta movado en profesia maniero, sen fanatikuloj kun ideologiaj frenezecoj kaj senĉesaj diskutoj. Por tio ni decidis agi kune por la SEL-Strategio. Se vi volas kaj povas dediĉi vian tempon (1-2 horoj semajne por senpaga intenca laboro) dum la ontaj 3 jaroj kaj povos ĉeesti unu el kelkaj planitaj SEL aranĝoj (unu semajno aŭ semajnfino) bonvolu skribi al:

<SEL.Reaktivigo (ĉe) gmail.com>



Kiom granda estas nia mondo

En pli ol 180 landoj estas skoltoj kaj skoltinoj, kaj jaro post jaro la nombro kreskas. Kio povas esti pli interesa esti membro de ĉi tiu vastega monda organizaĵo? Tendumadoj, marŝi en la naturo, la vivo ĉe la kamparo, estas gravaj spertoj de skoltismo. Geskoltoj ĉiam estas en la vojo serĉante novajn horizontojn, kaj novajn aventurojn.



Se nian skoltismon ni nure praktikas en nia propra grupo, en nia propra regiono, kie la personoj, la kamparo, la naturo kaj la moroj estas por ni tre konataj, tiam io mankas al nia vivo kiel skoltoj.

Nia teritorio estas la mondo. Malfermu vi la fenestrojn! Nur kiam ni kunlaboras kun skoltoj kaj skoltinoj de aliaj landoj kaj regionoj, ni estas vere membroj de tiu ĉi monda skolta familio!



Skoltoj relevas la flagon

Skolta Esperanto Ligo, preparas novan strategian agadplanon por memori ĝian 100-jarigon en 2018. La ligo de Esperanto parolantaj geskoltoj planas

revigligi ĝian agadon kaj oferi novan programproponon por la skolta movado per la popularigado de diverseco uzante la internacian lingvon.

SEL, la plej malnova internacia skolta organizo planas agi en la kampoj de informado (pri Esperanto en naciaj skoltmedioj ĉi-jare), trejnado (trejnseminarioj por novaj aktivuloj en 2011) kaj aplikado (internacia skolta tendaro en 2012).

SEL bezonas geesperantistojn, iamajn aŭ nunajn geskoltojn, kiuj volus kunlabori loke kun naciaj skoltasocioj aŭ internacie ene de SEL. Se Vi volas scii pli, bonvolu viziti retejon kaj skribi retmesaĝon por ricevi pliajn informojn.

Lukasz Żebrowski, Pollando
<esperanto.org/skolta>
<SEL.Reaktivigo (ĉe) gmail.com>



Membriĝi

Se vi ŝatas la ideon de SEL, kaj emas subteni ĝin, vi estas bona membra.

Skolta Esperanto-Ligo
av Des Muguets 39
1950 Kraainem
Belgio
fondita en 1918
sel (ĉe) scoutnet.org
www.esperanto.org/skolta/

NOVELETO 17 (7a-13a jarcentoj)

Mubaŝiro ar-Rumijo, maŭlao [liberigita sklavo, freŝa konvertinto aŭ islamano el nearaba deveno, ligata aŭ liginta al araba islamano, simile nomita maŭlao, per rilato de lojaleco kontraŭ ties protektado] de mia patro, rakontis al mi, ke li estis aŭdinta maŭlaon - al kiu li estis ligata antaŭ ol al mia patro, kaj konatan kiel Abu Utzmano Zakarijo al-Madanjo, filon de tia-tia, tre eminentan komerciston, riĉegan, fame konatan pro lia honoreco, kredindeco kaj lojaleco -, diri ke ...

... loĝadis najbare de lia domo, en Bagdado, homo kun nervoza temperamento kaj fervora por hundaj vetkuroj. Iam li tagiĝe foriris pro ia afero, kaj hundo aparte kara al li sekvis lin. Li forpelis ĝin sed ĝi ne foriris. Li allasis ĝin. Ĝi marŝis ĝis li alvenis ĉe homoj kun kiuj li estis en konflikto. Vidinte lin senarma, ili manprenis lin, kaj brutale enirigis lin en la domon, sub la okuloj de la hundo. Ili mortigis lin kaj entombigis lin en la puto de la korto. Ili batis la hundon, kiu, kvankam vundita, sukcesis eskapi el ili kaj reveni en la domon de sia mastro. Ĝi bojadis sed oni neglektis ĝin. La patrino de la homo zorgis pri li kiam lia foresto daŭris pli ol tago kaj nokto. Ŝi rimarkis la vundon ĉe la hundo, kaj eksciis, ke ĝi estas faro de la murdisto de ŝia filo, ĉar por ŝi li estis murdita. Ŝi celebris funebraĵojn por li kaj elpelis la hundojn el sia domo. Sed tiu hundo persistis resti apud la pordo kaj ne lasis forpeli sin el sia loko. De tempo al tempo, iu alproksimiĝadis kaj interesiĝadis pri ĝia farto. Iam, dum la hundo kuŝadis apud la pordo,

5
vojis preter ĝi unu el la murdintoj de ĝia mastro. La hundo rekonis lin. Ĝi ungis lian kruron, kaj mordis kaj kroĉis lin. La pasantoj klopodis liberigi lin, sed la hundo malebligis al ili tion fari. Elkrio eliĝis. La gardisto de la vojo alvenis kaj diris: « Ĉi hundo kroĉiĝas al tiu homo nur tial, ĉar ĝi havas kelkan aferon kun li. Eble li estas kiu vundis ĝin. » La patrino de la murdito eliris. Vidinte la homon kaj la hundon al li kroĉiĝantan, kaj aŭdinte la dirojn de la gardisto, ŝi atente rigardis la homon, kaj memoris, ke li estas unu el tiuj, kiuj eksterigadis malamikecon al ŝia filo kaj klopodadis por kvereli kontraŭ li. Ŝi ekkonsciis, ke li estas la murdinto de ŝia filo. Ŝi kroĉiĝis al li, akuzante lin pri la murdo. Ili kune submetis la aferon al la poliestro. Tiu ĉi enprizonigis lin, post ol li vane vergis lin por ke li konfesu. La hundo algluiĝis al la pordo de la prizono. Post kelke da tagoj, la homo estis forliberigita. Kiam oni elirigis lin per la pordo de la prizono, la hundo alkroĉiĝis al li same kiel ĝi jam antaŭe estis farinta. La homoj miris antaŭ tio. La poliestro sekrete taskis al unu el siaj policanoj apartigi la homon disde la hundon, sekvi lin, sciigi pri lia loĝejo, kaj kaŝobservi lin. Li plenumis la taskon. La hundo ne ĉesis paŝi malantaŭ la homo, dum la policano sekvis lin, ĝis la homo eniris en sian domon. La hundo rapidis hurli kaj ungostrate priserĉi la lokon, kie troviĝas la puto, en kiun estis ĵetita la murdito. La policano diris: « Fosu en la loko, kie la hundo ungostratas! » Fosinte en ĝi, oni trovis la murditan. La homo estis arestita kaj vergita. Tiam, li konfesis, ke la murdo estas faro sia kaj de grupo de personoj. Li estis ekzekutita. La aliajn grupanojn oni serĉis, sed ili sukcesis fuĝi.

At-Tanuĥijo,
Frandaj delikataĵoj de la konversacio.
Jacob Hasbun, membro de EBG, elarabigis

SONETO LAŬ VIKIPEDIO

6
Soneto (de la okcitana vorto sonet kaj la itala vorto sonetto; ambaŭ signifas 'kanteto') estas kvardeklinia versformo kun striktaj reguloj pri rimo kaj ritmo, tre populara en la okcidenta literaturo.

Formo : Soneto konsistas el 14 versoj grupigitaj en kvar strofoj, nome du kvarversaĵoj kaj du triversaĵoj. La poeto ordinare grupigas la versojn kaj ideojn en du malsimilajn duonojn. Kiel precize li faras tion, dependas de la tradicio: ĉu unuaflanke la ok versoj de la kvarversaĵoj kaj duaflanke la ses versoj de la triversaĵoj; ĉu unuaflanke la dekunu de la kvarversaĵoj kaj de la unua triversaĵo kaj duaflanke la tri de la lasta triversaĵo. La rimo estas ofte laŭ skemo abba abba cdc dcd, sed ekzistas pluraj aliaj formoj.

Ekzistas speciala versio, la ŝekspira soneto kiun ĉu inventis ĉu popularigis William Shakespeare, ĉe kiu la 14 versoj formas tri strofojn de po kvar versoj, kiuj kontrastas al la fina duversa 4a strofo.

Tute speciala variaĵo estas la sonetokrono, ĉe kiu unu soneto konsistas el la 14 unuaj versoj de l' ceteraj sonetoj de la ciklo.

Historio : La origino de la soneto estas la Italujo de la dektria jarcento, kie verŝajne inventis ĝin kortegano de la Imperiestro Frederico la 2a, eble Giacomo da Lentini. La plej fama frua sonetisto tamen estis Francesco Petrarca, kies Canzoniere (Kantaro) plejparte konsistas el sonetoj. Ankaŭ Giovanni Boccaccio kaj Dante Alighieri verkis multe da sonetoj.

La formo disvastiĝis dum mezepokaj tempoj de Italujo al la cetera

okcidenta Eŭropo eĉ antaŭ la komenco de la renesanco (15a jarcento). En Hispanio disvastigis ĝin Garcilaso de la Vega dum la 16a jarcento, kaj aliaj famaj sonetistoj estis ekzemple William Shakespeare (Britujo), Pierre de Ronsard (Francujo), Martin Opitz (Germanujo), Pieter Corneliszoon Hooft (Nederlando), Francisco de Quevedo (Hispanujo) kaj Jan Stanisław Skorupski (Pollando).

En Esperanto : Jam de la komenco oni tradukis sonetojn el naciaj literaturoj al Esperanto, ekzemple de Theophile Gautier, Hviezdoslav, F. Preseren, M. Under, ktp. Same, tre elstaraj esperantistoj verkis sonetojn en Esperanto dum la tuta historio de esperanto, kiel M. Bronŝtejn, Geraldo Mattos, Valentin Melnikov, Kálmán Kalocsay, Jan Stanisław Skorupski (kiu aperis pro siaj sonetoj verkitaj paralele en Esperanto kaj en la pola lingvo en la jaro 1997 en la Guinness-libro de rekordoj (germanlingva eldono 1997), kiel la poeto, kiu verkis la plej multajn sonetojn iam ajn en la historio de la monda literaturo), kaj multaj aliaj.

Nikolaj Nekrasov : aŭtoro de "Soneto pri Esperanto", esperantistiĝis en 1915. Rusiano kaj sovetiano. Ĵurnalisto, redaktoro, tradukisto. Kunfondinto kaj kunredaktoro de la revuo *La Nova Epoko* (1922-1930). Arestita kaj ekzekutita la 4-an de oktobro 1938 kiel "organizanto kaj gvidanto de faŝista, spiona kaj terorista organizaĵo de esperantistoj". Postmorte rehabilitita kiel senkulpa la 26-an de novembro 1957. Fonto: *Vojaĝo en Esperanto-Lando* de Boris Kolker.

POEMARO

TAGO DE LA POETO

Kastro Alves - Poeto, la plej granda,
La genia Kantisto de l' Libero,
Kantisto de Brazil' kaj ĉiulanda,
Kun ŝlosilo de Amo sur la Tero...

Kelkfoje, lia voĉo kun tenero,
Kvazaŭ la amkonfeso ĉe verando,
Ploranta sonorilo de l' vespero,
Aŭ tondro de l' tempesto en ekspando.

Kaj lia Kanto sekvas en la ondo,
Kunportanta Mesaĝon la plej fratan
Al la popoloj de la tuta mondo...

Kaj lia voĉ' resonas en la placoj...
- Mirinda tembro de l' Poet'amata,
Sen disting' de koloroj kred' aŭ rasoj!...

Sylla Magalhães Chaves, Brazilo,
je la 14a de Marto de 2009

SONETO

Sinpreparo por morto - maldecas.
Sinpreparon por vivi eterne
sobraj homoj nur ride aprecas,
sin fortunaj kun moko. En ver', ne

brilos eĉ nia Suno senfine,
nek florados plej puncaj papavoj,
kiuj estas sendube por mi ne
pli ol sango de patroj kaj avoj.

Ja nemulte da tempo en tuto
restis ekde la ĵusta minuto
ĝis foriro, forflug', malapero,

ĝis refoja papava reveno.
Vivoĝoj' multe pli ol ĉagreno
vokas min al papero.

Miša Bronštejn, Tiŝvin, S.Petroburgo, Rusujo
je la 4a de Septembro de 2004

7

SONETO

Intere la nokto kiu foriras
rapide, kaj l' naskiĝita aŭro,
en tiu senkonscia vivo-horo,
mia animstato febre deliras.

Mia fantazia dormo akiras
reala-vizion per mia koro,
kie la bildoj, en mia memoro,
haste el la inkubsonĝo foriras.

Solviĝas en la krepusko magia
la ombroj de la nokto efemera;
malaperas, pro la suno radia,

la sonĝoj kiel blovado aera...
En la eterna vivo agonias
sonĝo, kio estos la vero-vera?

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

SONETO PRI ESPERANTO

Vi, Esperanto, estas mia prismo,
Tra kiu vidas mi el mia ĉel'.

Tra vi mi vidas nigron de abismo,
Tra vi mi vidas blankon de ĉiel'.

Kun vi konverĝis mia organismo
Kaj eble do pro tiu paralel'

Mi mem en mia stranga egoismo
Reflektas Esperanton en malhel'.

Ĉu estas mi individu' unika,
Ĉu nura homarar', senkvalifika
Kaj kiun rolon ludas mia vers'?

Mi mian koron nur konscias bone
Batadi samregule, unutone
Kun la grandega kor' de l' univers'.

Nikolaj Nekrasov, Sovetujo

8

LA PREZIDANTO



Jakvo Schram

Tutmonda prezidanto de la plenuma komitato de SAT

Li nomiĝas Robert, sed ni ĉiuj
nomis lin simple Bob, kiu kutimas
inter ni laboristoj. Ĉu pigreco aŭ
kio, mi ne scias, sed maloftas ke
oni uzis la veran nomon. Neniam
iu nomis min Jakob aŭ laŭ franca
maniero Jacques, sed ĉiuj en medio
de diamantoj alvokis min per
familia nomo Schram (Ŝram).

Bob estis amiko de mi, ni ambaŭ
agadis en sindikato kaj dum
kunsidoj li ĉiam sidis apud mi.

Bob estis, nu, kun plej granda
respekto, simpla laboristo. Li
apenaŭ studis, sed kiam li post
bazalerno komencis labori en
diamantmedio, li ne iris kiel aliaj al
futbalo aŭ aliaj sportoj, sed restis
hejme kaj legis.

Preskaŭ ĉiam kiam mi vizitis lin, li
estis legante libron, ofte librojn de
filozofoj.

"Saluton Bob, kiel vi?"

- "Bone."

Bob legis kaj tiam ĝenis lin ke iu
alparolis lin.

"Kion vi legas?"

- "Libron."

- "Jes mi vidas sed pri kio?"

- "Ho, pri stranga knabo, li mem
neniam laboris en fabriko kaj
verkis dikan libron kiel laboristoj
devas agadi por liberigi sin de la
kapitalismo, kiu laŭ li estas
malbona."

- "Kapitalismo estas por ni
laboristoj malbona Bob."

- "Fek Ŝram, ne parolu kiel azeno
sen kapo. Se afero estis tiel facila,
ni eĉ ne devis fari penon studi.

Kapitalismo estas fi-uzata
ekonomia sistemo, kiel komunismo
estas fi-uzata ekonomia sistemo.

- "Montru al mi la libron. Ho La
kapitalo, ĉu pri kapitalismo?"

- "Ŝram, mi malamas vin, vi estas
kreteno kiu pensas per postaĵo."

- "Metu la libron flanken Bob, ni
devas urĝi al sindikatejo, venu mi
estas aŭte ĉi tie kaj ni tamen devas
urĝi por ke ni ne malfru."

- "Mi ne iras aŭte, tio estas
malbona por naturo, ni biciklu!"

- "Bob kara amiko, estas mezo de
la 70-aj jaroj kaj daŭros denove 30
jaroj antaŭ ol homoj serioze
komencas fari al si zorgojn pri
naturo."

- "Fek al la homoj, sed mi iras
bicikle, venu estas tempo."

Kiam ni eniris la sindikatejon, jam
pluraj kamaradoj sidis atendante
komenciĝon de la kunsido. La
kunveno estis sufiĉe granda kaj
la tabloj staris en rektangulformo,
por ke ni povu vidi al kiu aŭ kun

kiu ni diskutas. Kiel kutime la estraranoj sidis ĉe kapo de la tablo, en la mezo la prezidanto. Ni manpremis saluton, saluton, saluton, saluton, unu post aliajn la kamaradojn kaj kiam ni alvenis ĉe prezidanto, Bob jam tuj komencis ataki lin. Ili ne estas amikoj, la prezidanto kaj Bob.

Bob diras ke prezidanto estas korupta kaj malhonesto, kaj damne ke li pravas, sed kion fari? Kio finfine sindikato estas? Homoj kiuj elektas proprajn estrojn kiu decidi kiel laboristoj devis pensi kaj agadi.

Kiel ofte Bob ne jam diris; Sindikato devas esti aro da laboristoj kiuj grupiĝas por solvi problemojn, por klopodi plibonigi la vivon kaj vivkondiĉojn de la laboristo en tuta mondo, kaj jen vidu, ni kunvenas ĉiun monaton por aŭskulti la blekadon de tiu kretena prezidanto kaj mem apenaŭ havas eblon esprimiĝi.

“Saluton Stan” diris Bob kaj li manpremis la prezidanton. “Mi esperas ke hodiaŭ vi montras iom da respekto por la kamaradoj kaj ne ĝenas nin per du horoj de via kutima blekado”.

“Saluton Bob - diris prezidanto Stan - jes vere estas bela vetero hodiaŭ ĉu ne?”

Mi vidis kiel Bob ruĝiĝis en vizaĝo kaj ke li koleras nun. Estas tiel ke Stan, la prezidanto neniam donas respondon al demando aŭ al rimarko. Li ĉiam evitas respondi aŭ esprimiĝi. Ankaŭ al mi tio ege ĝenis, por mi tio estas montrado de malrespekto por homoj, sed nu

Stan kaj respekto, eble estas kiel akvo kaj fajro.

Je la 10-a la kunsido komenciĝis, kiel kutime kaj same laŭ kutimo Stan komencis paroli, paroli, paroli, senĉese. Ĉiam mi havis la pensojn ke li klopodis endormigi la partoprenantojn de la kunsido. Post duona horo Bob levis la manon. La prezidanto faris kvazaŭ li ne vidis tion kaj daŭrigas babiladon kiu interesas nenion.

Bob frapetis sur tablo kaj diris “He Stan!”. La prezidanto nun estas devigata rigardi kaj petis, “Jes Bob, kio gravas?”

-”Gravas ke vi tuj ĉesas bleki kaj donas al ni la parolvicon. Vi ne havas la rajton malebligi al ni nian opinion.”

-” Tuj Bob, tuj, mi preskaŭ finas kion mi devas diri, tuj vi povas paroli!” Kaj li reprenis laŭ sama teda maniero la parolon.

Denove duonan horon.

Bob ekstaris, la kapo tute ruĝa. Li metis la du manojn sur la tablo kaj diris ne laŭte sed tre firme; “Nun vi tenas la faŭkon kaj aŭskultas al la membroj de la kunveno!”

Ĉiuj en kunveno scias kio tio signifas. Bob estas tre gaja knabo, kiu ŝategas ridi, kiam li koleras li krias, sed kiam li furiozas, li havis parolmanieron kiu timigas ĉiujn, ĉu kolegojn, ĉu estrojn.

“Mi ĵus finis”, diris la prezidanto. Ni paŭzu kaj tuj, post dek minutoj, ni diskutu.

Bob prenis grandan glason da akvo kaj trinkis ĝin per unu grandega guto, malfermis la fenestron kaj prenis cigaredon kiun li komencis

fumi. Mi frapetis lin sur dorso kaj diris ke li devas teni trankvilon.

La paŭzo pasis kaj ni reprenis nian lokon. Kun mieno kvazaŭ li donis al ni milionon, la prezidanto diris: “Nu bone ni traktas nun eventualajn problemojn. Kiu havas ion por diri? Bob eble?”

La prezidanto ridetis kiam li nomis la nomon de Bob kaj mi vidis kiel mia kamarado iĝis ruĝa en vizaĝo. Ne, ĉi tio ne estas bona afero. Mi metis manon sur ŝultro de Bob kaj diris ke li devas resti trankvila.

“Nuna problemo ĉe estro Kugler superas ĉiujn imagojn - diris Bob. La homoj eĉ ne povas uzi necesejon, simple ĉar ne plu estas necesejo. Nu ja pisejo, sed tio ne sufiĉas. Estas ankaŭ ke Kugler postulas ke la homoj laboras post la kutimaj laborhoroj, kiu leĝe estas malpermesata.”

La prezidanto silente paroletis kun vicprezidanto dum parolo de Bob. Mia amiko vidis tion kaj kriis “Ĉu damne ne interesas al vi kreteno?”

“Ho - respondis la prezidanto - mi rakontis al Eddy, la vicprezidanto, ke mia filo bonege ludis lastan dimanĉon dum maĉo de pilkludado”.

Antaŭ iu havis eblon bone kompreni kion prezidanto diris Bob ekstaris kaj renversigis la kunfiksatajn tablojn de la maldekstra flanko de la kunvenejo. 4 tablojn fiksate unu al alian, plene de boteloj da akvo, kafpotoj kaj ĉiuj tasoj kaj subteleretoj. La bruo estas enorma.

Tute blanka pro kolero Bob staris tion, forte spirante. Mi timis ke li

tuj havus koratakon sed ne kuraĝis diri ion.

Neniu diris ion, estis kompleta silento en kunvenejo de sindikato.

Tiam kun mallaŭta voĉo Bob diris: “Vi estas en via lasta jaro kiel prezidanto de sindikato. Mi ne plu ripozas ĝis oni forigas vin. Ĉion, kion mi scias pri viaj koruptaj agadoj mi disvastigas kie mi povas”. Kaj tiam li forlasis ejon, malrapide.

Mi ekstaris kaj petis al aliaj sindikatistoj sekvi Bob, el solidareco por lia agado. Nur 5-6 homoj sekvis min.

Bob pravis. Bob malpravis. Li pravas ke li postulis respekton. Li malpravis renversigante la tablojn, sed en koro mi subtenis lin.

Naŭ monatoj poste la prezidanto fruemeritiĝis. La ĉefprezidantino de sindikata federacio ricevis tiom da akuzoj, ne nur de Bob sed ankaŭ de aliaj sindikatistoj pri la koruptado de Stan la prezidanto de diamanta sindikato ke ŝi povis preni nur unu decidon.


Ŝi invitis Bob kaj prezentis al li la postenon de prezidanto. Li rifuzis. Eĉ pli, li ne plu kandidatiĝis por resti reprezentanto en sindikato. Tamen li ricevis tiom da favorajn voĉojn ke li ne povis malakcepti daŭrigi lian laboron en sindikato.

Unu aferon mi rimarkis. Kiam Bob parolis dum kunsido de sindikato, ĉiuj silentis, ĉiuj aŭskultis. Mi neniam komprenis, kial necesas la renversigon de tabloj por havi respekton en grupo kiu propagandas solidarecon.

Jakvo Schram, Antverpeno, Belgujo

ITALA 77A KONGRESO

La Itala E-Federacio okazigis la 77an Kongreson, la 21an ĝis la 28an de Aŭgusto 2010, en la belega duoninsulo Linjano Orsabla (itallingve *Lignano Sabbiadoro*), inter Venecio kaj Triesto, nordoriente de Italujo.



Plaĝo de Linjano Orsabla



Urba centro de Linjano Orsabla

11

77^a Itala Kongreso

esperanto

Lignano Sabbiadoro

Diritti linguistici nella società multiculturale europea

| | | |
|--|---|---|
| CONCERTI ingresso gratuito Villaggio Turismo Co. Tur. Viale Venezia 29 Sabato 27 agosto h. 20 Domenica 28 agosto h. 18 Inaugurazione 22 agosto h. 18:30 prof. Davide Astori Università di Parma Con un messaggio di saluto di Momi Osadia Scrittore Centro Civico Via Trento 2 - Lignano Sabbiadoro da sabato 21 a sabato 28 agosto 2010 800000 Esperanto lingua internazionale | INAUGURAZIONE Sala Bla - Centro Co. Tur. Viale Venezia 29 Domenica 22 agosto h. 10 prefazione Zlatko Tisljar PRESENTAZIONE Ma l'esperanto è davvero una lingua? Domenica 22 agosto h. 18:30 prof. Davide Astori Università di Parma Con un messaggio di saluto di Momi Osadia Scrittore Centro Civico Via Trento 2 - Lignano Sabbiadoro da sabato 21 a sabato 28 agosto 2010 800000 Esperanto lingua internazionale | Corso estivo gratuito di esperanto lingua facile lingua d'esperazione lingua giovane lingua viva Palazzo Pinza - Centro Co. Tur. Viale Venezia 29 Lunedì 23 agosto, h. 9-13 e 16-20 Martedì 24 agosto, h. 9-13 Giovedì 26 agosto, h. 9-13 e 16-20 Venerdì 27 agosto, h. 9-13 e 16-20 La manifestazione è aperta a tutti e ad ogni conoscenza del italiano per accedere al proprio servizio |
|--|---|---|

Oficiala anonco de la Kongreso



Ses kongresanoj venintaj de Belgio



Organizantoj Bruĉjo Kasini kaj Laura Brazzabeni



Deflanka vido de la dimanĉa oficiala inaŭgura malfermo en salono Zamenhof



Malantaŭa vido de la inaŭguro dum staranta kantado de la himno de Esperanto



Ĉeestantoj dum la inaŭguro



Lasttaga oficiala fermo kun (maldekstre deksten) Nicola Minnaja, Laura Brazzabeni, parolante Ranieri Clerici, Bruneto Casini alias Bruĉjo Kasini, Michael Boris Mandirola



Koncerto de Bronštejn



Tramara atingo de ekskurso al Venecio, placo de Sankta Marko



Polemika ponto de Santiago Kalatrava en Venecio



Ĉefa apudmara placo de Triesto



Triesta haveno vidita el la karsta montaro



Nia membro kaj preleganto Bernard-Regis Larue, kun italoj Giuseppe Lalli kaj Giorgio Denti, piediris al Slovenujo (ŝtatlimbordo) tra la Triesta Karsto

Al Itala Kongreso aliĝis 332 kongresanoj el 37 landoj, tamen kelkaj neeŭropanoj ne atingis la kongresejon pro kialoj kiel manko de pasporta vizo. La LKK, landa kongresa komitato, estis konstituita de Renato Corsetti, Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni, Nicola Minnaja kaj Boris Mandirola. La kultura programo havis koncertojn de Jean-Marc Leclerc alias JoMo, Mikaelo Bronŝtejn, Georgo Handzlik, Amir EspoDospo, Ĵomart kaj Nataŝa. Tuttagaj ekskursoj estis al Venecio, Treviso kaj Triesta Karsto. Prelegoj de Davide Astori, Katalin Kováts, Zlatko Tišljár, inter alie. Anoncitaj en la programo Roman Dobrzynski, Tatjana Aŭderskaja kaj kantistino Irena Urbanska ne venis. Grazina Opulskiene kaj Anna Löwenstein gvidis perfektigan kaj enkondukan kursojn de Esperanto tra rekta metodo de Andreo Cseh. Boris Mandirola organizis ĉiuvesperan kaj noktan interesan programon kun muzikado, dancado, ludado, gustumadoj de produktoj de la regiono kaj de la tuta Italio tiel kiel vinoj, fromaĝoj, dolĉaĝoj. La strandoj kaj plaĝoj apud kongresejo estis abunde uzataj por banado kaj sunbrunigado. Aliĝoj estis jam akceptataj por la 78a Itala Kongreso, okazonta la 20an ĝis la 26an de Aŭgusto 2011, en Torino, unua ĉefurbo de unuiĝinta Italujo.

P. Branco

RUSIA ESPERANTUMADO

Dum majo kaj junio de 2010 ni vojaĝis al Riga, Sankta Peterburgo, Moskvo kaj Tallinn. Nia ĉefa celo estis partopreni en la 26an REK, Rusia Esperantista Kongreso, kiu okazis fine de majo en Sankta Peterburgo, Rusujo.



Marlène kaj Arie en Moskvo

Kongreso en St. Peterburgo

La REK26 estis okazigata kaj organizata de la klubo de esperanto de Sankta Peterburgo kaj de REU, Rusia Esperantista Unio <<http://www.reu.ru/>>, por jubilei la 100-jaran datrevenon de la unua Rusia Esperantista Kongreso. En tia unua rusia kongreso de 1910 estis partoprenintaj Zamenhof kaj eĉ Lenino. Nun partoprenantoj estis pli ol 200 gesamideanoj. Plej multo de ili estis Rusoj, tamen eksterlandanoj estis el 25 aliaj landoj. Enloĝantoj de Francujo estis ses, tri el cento de la partoprenantoj. La organizado en Sankta Peterburgo bedaŭrinde ne estis granda sukceso. Ekzemplojn de malorganizo mi donas tuj. Gvidantoj alvenis ĉiam tro malfrue

al la diversaj ekskursoj al kiuj ni partoprenis. Ni konstatis ankaŭ ke sidlokoj ne sufiĉis en la ekskursaj aŭtobusoj. Atendado estis ĉiama, pro manko de aŭtobusaj sidlokoj oni necesis alvoki pliajn busetojn kaj tio signifis denove atendadojn, plurfojaĵajn longajn atendadojn. Dum la ekskursoj la organizantoj aŭ la gvidantoj ne kontrolis la nombron de partoprenantoj, konsekvence partoprenantoj maltrafis la revenon! Pro tio ni demandis nin, ĉu la kalkulado estas malfacila por la rusoj? Same la rusa lingvo estas malfacila kaj eĉ tutcerte nekomprenebla por ni! Du malgrandaj restoracioj funkciis en la kongresejo. Sed traduko de la menuoj mankis. Kiam tute hazarde rusparolantaj esperantistoj ĉeestis en restoracio, ili povis helpi nin pri mendo. Kiam ili ne ĉeestis kaj ni volis mendi ion, ni devis imiti la bruojn de porko, kokido, bovo por sciigi kiun ni volus manĝi. Tamen por imiti fiŝon estus malfacila. Feliĉe la urbo estis tiel interesa ke ĝi lasis al ni belan memoron. Dumtage aliaj artaj programoj kaj kunvenoj ankaŭ okazis, al kiuj ni ne povis partopreni ĉar ni ekskursis. Ni traveturis pere de buso al la urba centro kaj vizitis la muzeon Ermitaĝon, la PetroPaŭlan Fortikaĵon, la palacon Peterhofan kaj ĝian parkon kun fontanoj, ktp. Dumnokte ni partoprenis boatekskurson sur la rivero Neva trapasante multajn pontojn supren movigitajn. Post la fino de la kongreso ni veturis en la nokta

trajno al Moskvo (+/- 700 km) kie la postkongreso estis okazigata.



Ortodoksa cerkvo kun muzeo, Ruĝa placo, Kremlo

Postkongreso en Moskvo

El la 200 kongresanoj restis 25 eksterlandanojn kiuj partoprenis la postkongreson. En Moskvo Svetlana Smetanina respondecis pri la organizo. Multe da Bezieranoj konas ŝin, ĉar ŝi jam instruis esperanton dum la staĝoj de Sète. Ŝia organizado en Moskvo estis tute alia ol tio kion ni spertis en Sankta Peterburgo. Ŝi organizis tre bone, komplete, detale kaj akurate. Ŝi havis multe da lernantojn kaj kunlaborantojn, de ŝia Moskva Esperanto-Klubo, kiuj ankaŭ akompanis kaj helpis restadiĝi nin kune, en unu nura grupo, dum niaj vizitoj tra la urbo pere de la metroo. Tio estis malfacila tasko, ĉar ni uzis ofte la metroon. Iu vespero ni uzis ĝin kaj vizitadis eĉ dek metroajn staciojn, kun speciala ĉiĉerono, por admiri la belajn artaĵojn, pentraĵojn kaj skulptaĵojn, interne sur la kajoj. Moskvo havas pli ol dek milionojn oficiale registritajn enloĝantojn. La metroo transportas ĉiutage laŭdire

sep milionojn da pasaĝeroj. Ege impresis al ni la viziton de la Ruĝa Placo ene de la Kremlo, kaj vizitojn de preĝejoj, muzeoj, parkoj, malnova urbocentro. Tiuj vizitoj estis aliflanke ege laciĝantaj. Ĉiutage ni foriris el nia hotelo je la 9h30 matene kaj revenis nur je la 23a horo. La Moskva Esperanto-Klubo akceptis nin iun vesperon kun arta programo kaj vespermanĝo. La okazigo estis tre simpatia. Ni ne trovis oficialan informojn por la turista publiko en Sankta Peterburgo aŭ en Moskvo. Indikoj aŭ klarigoj kompreneblaj de ni estis ne troveblaj. En la metroo ĉio estas skribita nur en la rusa lingvo, kun kirilaj literoj de la rusa alfabeto, tute strangaj por ni ĉar diferencaj de niaj latinaj literoj. Pro tio, gvidado far de esperantistoj estis tre utila, eĉ nepra.

Eksterlandanoj povas viziti tiujn urbojn nur kun ĉiĉerono. Post kvin tagoj en Moskvo ni forflugis al Tallinn en Estonujo.

Vizitoj de Riga kaj Tallin

Kiam ni decidis partopreni la ĉi menciitan kongreson kaj postkongreson, ni decidis profiti kaj kapti la okazon por viziti dumvoje ankaŭ la ĉefurbojn Riga kaj Tallinn. Ili lokiĝas en apudaj landoj de Rusujo, respektive en Latvujo kaj en Estonujo. Okaze de la Universala Kongreso en Vilno antaŭ kelkaj jaroj, 2005, ni jam vizitis Litovujon. Tiuj estas la tiel nomataj tri baltiaj landoj. Por viziti Riga kaj Tallinn ni ne bezonis

15
vizon. Male, por Rusujo, ni devis havi invitleteron kaj specialan asekuron por akiri la vizon. Antaŭ la kongreso en Sankta Peterburgo ni haltis kelkajn tagojn en Riga. Riga estas tre bela malnova urbo. Tie ni renkontis esperantistojn kiuj promenis kun ni en la urbo kaj invitis nin partopreni piknikon de krad-rostado kun aliaj klubanoj. Post Moskvo ni vizitis urbon Tallinn dum kelkaj tagoj. Tallinn estas ankaŭ tre bela malnova urbo. Same tie ni renkontis lokajn esperantistojn.



Ĉi-sube menciata oportuna efika rubaĵujo cendrujo
Niaj impresoj kaj konkludoj

- Sankta Peterburgo kaj Moskvo estas imponaj urboj pro iliaj ornamaĵoj kaj pro ilia grandeco.

- Granda diferenco notindas inter unuflanke la palacoj de la riĉuloj de la antaŭa tempo, la novaj riĉuloj, la preĝejoj kaj aliflanke la malriĉa popolo.

- Rusa lingvo ankaŭ estas atakata de "virusoj" : ni rimarkis ke la angla lingvo ĉi-tie aperas en afiŝoj de firmaoj. Ni demandas nin, ĉu rusoj komprenas ilin kaj eĉ povas prononci ilin korekte? Ni dubas!

16
En Francujo, same kiel en aliaj landoj, firmaoj ofte nepras enkonduki anglajn vortojn en ilia propagando. Ĉu ili faras tion eble por altiri la turistojn? Kiel ekzemplo ni mencias iu "marché", konata granda vendadgrupo, kiu aldonis la vorton "market" al ilia panelo. Dum radioelsendo oni aŭdas vortan prononcadon "marKET" franclingvmaniere. Ĉu la aŭskultantaj anglalingvaj turistoj kapablas kompreni tian prononcadon? Kaj ĉu ili pli bone komprenas ol komprenus la vorton "marché"? Ni dubas!

- Slogano en Rusujo: "Dividu la laboron, kaj pli da homoj povos labori". En Rusujo ni vidis ofte grandan teamon de purigantoj, ordigantoj de publikaj ĝardenoj. En vendejoj ankaŭ, estis granda la kvanto de vendistinoj kiuj deĵoris. En trankvila parto de Sankta Peterburgo okazis ke ni vizitis belan preĝejon. Kiam ni eniris, mi devus prezenti min al giĉeto por ricevi necesajn enirbiletojn. Ses metroj poste dua virino staris kaj kontrolis la biletojn. Mia edzino demandis min kiom da rubloj mi pagis por la eniro. Mi devis respondi: nulo rublo! Ni miris pri

tio. Mi kontrolis kaj kalkulis kiom da vizitantoj eniris la preĝejon dum unu horo kaj duono: nur kvin aliaj. Aĝaj gegardistoj ĉiam deĵoras en ĉiu ĉambro de preĝejoj kaj muzeoj. Okazas eventuale ke iu kaj aliu trankvile endormiĝas en sia seĝo, verŝajne songante ankaŭ pri la slogano "dividu la laboron"!

- En vizititaj urboj: Riga, Sankta Peterburgo, Moskvo kaj Tallinn, ni trovis la stratojn ege pli puraj ol tio kio ni estas alkutimitaj en Francujo kaj Belgujo. Restaĵoj de cigaredoj estis ne troveblaj. Triono de la vendejoj en la centro de Riga kaj Tallinn havas, tre oportune kaj efike, rubaĵujon fiksitan al la facado ekstere, kun cendrujo supre. Fekaĵoj de hundoj estis ne videblaj. Nur unu foje ni vidis du malgrandajn hundetetojn en Riga. Ni imagas ke ili ne kuraĝus feki!

- La aŭtomobiloj tuj haltis kiam ni trankvile alproksimiĝis bordojn de trotuaro, eĉ se ni tute ne intencis trairi straton. Ĉu kontrolo kaj monpunoj estis la rimedo de edukado de tiuj popoloj?

- Ni havas tutcerte agrablan kaj belan rememoron.

Marlène kaj Arie Bouman,
Portiragnes (34) Francujo, Knokke-Heist Belgujo



Panoramo de la urbo Sankta Peterburgo kun la muzeo Ermitaĝo maldesktrite kaj la Admiraltejo dekstre



6-a AZIA KONGRESO



ULANBATORO - MONGOLIO



19.6. - 23.6.2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

6-A AZIA E-KONGRESO

De la 19a ĝis la 23a de junio okazis en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, la 6-a Azia kongreso de Esperanto. La kongresa temo estis "Azia harmoniigo per Esperanto". Ĝi altiris precipe azianojn, sed partoprenis ĝin ankaŭ kelkdeko da alikontinentanoj. 24 entuziasmuloj alvenis per la Tra-Siberia Fervojo. Entute la eventon ĉeestis pli ol 200 kongresanoj el 27 landoj. Mankis nur afrikanoj. La kongresejo troviĝis en luksa kvinstela hotelo Ĉingis-Hano proksima al la urbocentro.

La kongreson organizis KAEM (Komisiono pri Azia E-Movado) kun lokaj esperantistoj. En la kunsido de KAEM estis elektita nova prezidanto. En la malferma ceremonio la kongreson salutis anstataŭanto de la ĉefministro. Oni legis kelkajn salutmesaĝojn kaj poste la membroj de la partoprenantaj landoj salutis la ĉeestantaron.

Multaj interesaj debatoj, seminarioj, prelegoj kaj aliaj altiraj programeroj okazis dum la kongresa semajno: Interkona vespero, fakaj kunsidoj, oratora konkurso, konversaciaj rondoj, aŭkcio, nacia kaj internacia vesperoj. Ni konatiĝis kun mongola historio, arto kaj kulturo, ni provis lerni la mongolan lingvon kaj eksciis pri la Mongola E-movado, pri Esperanto en Unesko. Interesa kaj inspira estis elmontro de kaligrafio de la tuta Azio. Ankaŭ gejunuloj havis sian kunsidon, eĉ sport-amantoj de tabloteniso kaj diversaj religiaj grupoj trovis sian lokon tie.

Dum la tuttaga urba ekskurso ni konatiĝis kun vidindaĵoj de Ulanbatoro kaj de supre ni povis vidi tiun pli ol milionhoman metropolon.

Nacia vespero okazis en teatro ekster la kongresejo. Ni spektis tradiciajn dancojn, kantojn kaj akrobataĵojn fare de profesiuloj. Ĝi estis admirinda spektaklo de arta scipovo kaj prezentado. Same belan kaj altkvalitan prezentadon ni povis spekti en la kongresejo plenumita de infangrupo. La internacia vespero estas tradicie dediĉita al talentoj el niaj vicoj. La vespero komenciĝis per parado de ĉiuj kontribuintoj en naciaj kostumoj. Japanoj paradis vestitaj en "jukata" vestaĵoj. Poste oni montris al ni kiel surmeti kimonon. Prezentiĝis diversaj muzikistoj, japanoj kaj ĉinoj montris ion el sia kulturo kaj ni admire spektis tiun kulturan kalejdoskopon...

La Azia kongreso estis vere impresa kaj fruktodona renkontiĝo. Ĝi liveris al esperantistoj la eblon ĝui eksterordinare belan etoson, formi novajn amikecojn kaj malkovri mirindajn regionojn de la dezerto Gobi dum la turismaj antaŭ- kaj post-kongresaj ofertoj. Malfacilas esprimi en unu paĝo ĉiujn nuancojn de tiu bela evento. Denove pruviĝis, ke Esperanto estas la Internacia lingvo de komprenemo kaj amikeco. Mi certas, ke ekde nun la movado tie plifortiĝos, ĉar la entuziasmo de mongolaj esperantistoj estis grandega. Por multaj el ili la kongreso estis unika sperto.


En la Azia kongreso ni harmonie esperantumis, ĝuis agrablajn eventojn kaj amikajn renkontiĝojn, kio donis al ĉiuj grandan ĝojon kaj entuziasmon daŭrigi poresperantan vojon.

Liba Gabalda, Francujo



Bildoj instruaj pri brikolaĝo, ĝardenado, lernejo, ludoj kaj ludiloj

MARC DEMONTY



Elstara membro, instruisto kaj preleganto de EBG